GISTO-AUG-2003.

VASKE, Georgo Otto
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
otto@caiweb.com.br
Lau TTT-teksto – Senpaga legajxo.

ELSTARULO EN RS.

Estis bezone veni al Brazilo eksterlanda junulo, por vere aktivigi fekundajn nichojn favoran al Esperanto far katolikoj. Gisto prezentas lin: LEYSESTER JOSÉ FLORES MIRÓ.Unue ni havis telefonan kontakton. Lia "vizitkarto" = flua E-parolado, funde tusxis mian koron. Ni interkonsentis viziton. Lastan dimanchon, 17/08/03, li veturis de Kasxias al mia urbo. Li konatigxis kun la urbeto kaj elstaraj ejoj. Ni decidis tagmangxi ne sen inviti mian E-lernantinon Marga. Sxi, domagxe, havis kompromison kaj ne povis akompani nin. Dum la mangxado mi sciigxis pri la vivo kaj celoj de Leysester (Lejsester). Li naskigxis en Venezuelo 24 jarojn antaue. Li studas por ordenigxi Frato kaj post kelkaj monatoj li kompletigos la respektivajn lernobjektojn. Dumtempe li restadas en Kasxias-RS. Lau li, de nur ok monatoj li lernis/as Esperanton. Eble chiuj gelegantoj scivolas pri lia kapablo paroli la internacian lingvon. Nu, memkompreneble mi invitis lin prezentigxi al chiuj rondanoj dum Verda Kafo. Bedaurinde, li pretekstis chiusabatan okupon. Tio malebligas lin nuntempe veturi al Porto Alegre en sabato sed, mi tre esperas ke, antau ol reflugi al San-Paulo li sukcesos finti kompromisojn sen kompromiti sian rigoran konduton, por konatigxi kun chiuj kompanoj de nia tradicia kunsido kaj plezurigi la cheestantojn per sia fervora esperantisteco kaj, kial ne, konkeri la favorkorecon de chiuj, per sia charma figuro. – En la verko "ESPERANTO o Novo Latim da Igreja e do Ecumenismo", far Ulrich Matthias, enestas dankesprimo al Leysester pro lia persista insisto kun la celo eldoni la libron. – Do, aktivaj katolikoj brazilaj, ni kaptu la bonsxancon dum ni kalkulas pri juna, aktiva diligentulo, por almenau samniveligi la Esperanto-disvastigon kun aliaj religiaj organizajxoj. Leysester havas tre taugajn trajtojn por definitive klarigi al chiuj katolikoj ke, malgrau la aspekto, la vortoj Esperanto kaj Spiritismo nur interrilatas pro la libera uzo de Esperanto far chiu ajn organizajxo. Okazas ke en Brazilo la spiritisma movado estas forta kaj vigle subtenis Esperanto-lernadon per eldono de libroj sed la katolikoj, pro memtrompo, neglektis vastan subtenon al la nobla idealo krei neutralan ponton inter chiuj popoloj. – La menciitan libron chiuj devus akiri, legi kaj donaci al suspektemaj katolikoj. Almenau la homoj, kiuj ne plenumis la taskon, leteri al la Papo, devus kompense fari chi investon kun la celo vastigi nian "trancheon" kaj plenigi gxin per katolikaj batalantoj dum lia mosxto la Papo ne signaturis "legxon" kiu rekomendas al chielano-kandidatoj esperantistigxi.

FIERO/TIMO/HONTO.

Jen la ingrediencoj kiuj bremsas rimarkindan progreson direkte al la kapablo flue paroli fremdan lingvon. – FIERO, pro la opinio pri si mem, ke li/sxi sufiche bone kapablas kompreni kaj komprenigi sin, ke lerni pli estas tro laboriga. Ili forgesas ke gesamideanoj iomete pli kapablaj sentas moralan devon plialtigi la scion de progresantoj tamen, se fiero malhelpas ke ili petu helpon, malfacilas ke bonvolaj homoj donu la etetan antauenan pusxon. Mi opinias utilega la lautvochan legadon kun samtempa klarigo pri vortoj kaj ties

sintaksaj funkcioj. Mi referas al verboj, transitivaj au ne; mi reliefigas la valoron esti kapabla identigi almenau la plej uzatajn prepoziciojn. El tio rezultas la gxusta uzo (au ne) de akuzativoj. Kiu parolas au skribas ion tuj tuj altiras la admiron de kiu rimarkas plejzorgon far la (ge)samideano(j) kiu adresas vortojn al aliuloj. Tio chefe gravas por homoj kiuj respondecas pri organizajxo. Ili havas sur siaj sxultroj la devon altkvalite reprezenti sian kolektivon antau la ekstera publiko. Ne chiam cheestas helpanto kiu scias gxustigi la tekston. – La du aliaj eroj, Timo kaj Honto, farigxas konsekvencoj de la unua.

T- CHEMIZOJ

Nia E-generalo Amariljo Karvaljo pretigis stokon da 200 T-chemizoj por disvendado dum la pasinta Konreso en BH. Pro nesuperebla motivo li ne povis cheesti la Kongreson. Li faris grandan investon kaj nun sendas SOS al chiuj ni, kun peto, ke oni helpu lin malpezigi la grandan elspezon: chiu mendu kelkajn T-chemizojn, por si kaj por geamikoj . Ili kostas po 15 Realoj sed ricevas dek procentan rabaton mendoj je 5 au plia T-chemizoj. Kontaktu lin – Posxtkesto 246 - Barra do Garças-MT – 78600-000. = Telf.66 – 401.8199 nur vespere!

KURIERO

La orkora gaúcho, posxtisto de la brita regxino, persone akompanis la eventojn de la chijara Esperanto-chefurbo Gotenburgo kaj bonvolis sendi al mi la respektivan sesfolian kurieron. Interesaj enhavoj, legindaj... – Dankegon, kara LoMo! – Baldau mi QRM-os lau ECHOLINK, se promeso de teknikisto validas.

KONVERTILO

Nia diligenta Ennio, Torres, malkovris tre interesan utilajxon far austra "sciencisto": Oni tajpas, ekz., C plus X, farigxas chapelita C; oni tajpas S plus X, farigxas chapelita S...ktp. Chu iu el niaj rondanoj jam konis tiun praktikan sistemon? Mi ankorau ne provis chu tiaj literoj trairas komputilojn sendifekte, cetere mi ankorau ne scias kiel utiligi la Konvertilon kiam oni tajpas lau la WORD-fontoj.Gxin mi ricevis per TTT-ejo kaj nur surloke provis.

TESTO

Inoj naskigxas knabinoj, farigxas fraulinoj, edzinoj, eks-edzinoj kaj/au "Franco-atiradores", oni kutimas diri en Brazilo.- Kiu estas la gxusta E-vorto por chi-lasta difino? – KLARIGO por ne-brazilanoj: la vorto signifas homo sen partio, unuopa batalanto... – Kiu estas la trafa traduko por la vorto DEFICIENTE (homo kun fizika/mensa manko?)

BONHUMORO – El Juna Amiko.

Du viroj samtempe petis la manon de mia solfilino, ingxeniero kaj kuracisto, diris familiestro.

- Kaj, kiu farigxis la felichulo?
- La ingxeniero. Sxi edzinigxis al la kuracisto.

1

KARKAMANO

Viandiston demandas lia amiko: kial vi tenas spegulon super la pesilo?

Tiu ridetas – Chu la klientoj rigardos la montrilon de la pesilo, kiam ili povas admiri sin en la spegulo? – Klarigo pri "karkamano"= homo ne plenhonestulo.